ANNO 90 NUMERO 5 SETTEMBRE/OTTOBRE 2013

L'esperanto

Revuo de Itala Esperanto-Federacio

Rivista inviata in abbonamento agli associati FEI (vedasi p.2)
Prezzo di un singolo numero 2 € per l'Italia 3 € per l'Estero

Anche Vicenza compie cent'anni

Poste Italiane S.p.A. - Spedizione in abbonamento postale 45%, D.L. 353/2003 (conv. in L. 27/02/2004 n.46) art.1, comma 1, DCB ROMA

Federazione Esperantista Italiana

ISSN 1974-9147
9 771974 914006 13005

Historio de Vicenza E-Centro
Filippo Zanoner
pagina 3

Castellaro 2013
Ermigi Rodari
pagina 5

Impressioni di un Komencanto
Alberto Muzzu
pagina 7

Mia unua Nacia Kongreso
Paola Tosato
pagina 8

Sin kompreni por sin respekti
Humphrey Tonkin
pagina 9

Interreta estonteco de nia revuo
Daniele Binaghi
pagina 12

Se il governo prepara la stangata
Renato Corsetti
pagina 14

Nova Sento
Samanta Chittolina
pagina 21

ENKONDUKO

Pasis somero kaj alia sukcesa Kongreso enarĥiviĝis, internacia, riĉa je eventoj, prelegoj, kursoj. Jen la kvalitoj de niaj lastajaroj (inter)naciaj kunvenoj. La venontan jaron, tamen, laŭ mia vidpunkto, estos pli malfacila provo: montara kongreso iom malproksime de grandaj turismaj lokoj, kvankam preskaŭ meze de Uneska Mondheredaĵo, la Dolomitoj. Espereble eksterlandaj samideanoj konscios pri tio...
En ĉi tiu numero, kiel kutime post la somero, vi povos legi raporton pri la pasinta kongreso, okazinta en Castellaro. Eĉ pli ol unu, por koni diversajn vidpunktojn pri la evento. Krome vi povos, preskaŭ ĉeeesti la inaŭguron, legante la belan festparoladon de Hunphrey Tonkin, atendante la specialan numeron dediĉitan al la Kongreso, kiu publikiĝos kiel sesa numero de la revuo.
Fine, krom la kutimajn rubrikojn pri lingvo kaj elektroniko, vi povos legi la historion de la Vicenza E-Centro, kiu, kiel aliaj, iom post iom, fariĝis centjara. Mi renovigas la inviton al la grupoj, kiuj esploris siajn historiojn, sendi ilin al la revuo, tiel ke ili restu surpapere por venontaj historiistoj.
Krome, mi renovigas ankaŭ la inviton al muzikŝatantoj anonciĝi kiel recenzistoj, por tiel ricevi diskojn recenzotajn.
Agrablan legadon,

Pier Luigi Cinquantini

Direttore Responsabile e Redattore
Leĝe Respondeca Direktoro kaj Redaktoro:
Pier Luigi CINQUANTINI
via Dante Alighieri, 2, I-01010 Blera
tel.0761 479 503 - revuo@esperanto.it
*****
Amministrazione – Administrejo:
FEI – Via Villoresi, 38 – I 20143 Milano
tel.02 5810 0857 – fax 02 3674 0711
fei@esperanto.it -
http://www.esperanto.it
C.F.80095770014
*****
C. C. Postali – PoŝtKontoj:
C.C. postale FEI: n.37312204
IBAN: IT94O0760101600000037312204
C. C. postale FEI libri (per l'acquisto di libri): n.54614524
IBAN: IT11K0760101600000054614524
*****
C. C. Bancario – Bankkonto:
Banca Intesa - S.Paolo, Ag.002 Milano
IBAN: IT76Q0306909445100000007981
C. C. Bancario FEI libri
IBAN: IT46H0306909445100000009328
Conto UEA – UEA-Konto: iefa-p
*****
Comitato Esecutivo FEI - IEF-Plenuma Komitato:
Aldo GRASSINI, presidente
Renato CORSETTI, vicepresidente
Laura BRAZZABENI, segretario generale
Francesco MAURELLI, cassiere
Federico GOBBO
Brunetto CASINI
Michael Boris MANDIROLA
*****
Pubblicazione riservata agli Associati.
Quote associative 2012 (comprensive di € 10 dell'abbonamento alla rivista, per tutti gli associati tranne gli Associati Familiari)
Associato ordinario € 28,00
Associato sostenitore € 84,00
Associato garante € 280,00
Associato fino a 25 anni € 14,00
Associato familiare € 14,00
Iscrizioni presso i gruppi locali oppure direttamente presso l'amministrazione FEI.
*****
La Gioventù Esperantista Italiana (IEJ) è la sezione giovanile della FEI e ne fanno parte gli Associati fino all'età di 30 anni. La IEJ cura la redazione della rubrika "Nova Sento" che compare in questa rivista.
*****
Registrazione al Tribunale di Milano n.85 del 27 febbraio 1970.
Stampa: Tipografia Agnesotti - Str. Tuscanese km 1,700 - 01100 Viterbo - Tel.0761 251 025
Progetto grafico - Grafika ideo
Federica Ursig - Davide Amadei
*****

In copertina: Momento dei festeggiamenti per il centenario del Gruppo Esperantista di Vicenza

HISTORIO

Historio de Vicenza E-Centro

Filippo Zanoner

Tiu ĉi teksto estis elĉerpita el la enkonduko de Filippo Zanoner, prezidanto de la Vicenza Esperanto Centro, okaze de prelego pri lingva demokratio de profesoro Carlo Minnaja, organizita ĉe FestAmbiente-Vicenza por festi la centjariĝon de la grupo. La informoj estis kolektitaj de Gianni Franzina, Galdino Pendin kaj Filippo Zanoner.

Mi antaŭdiras ke kondensi en malmulte da minutoj centjaran historion devigas min nur rapide aludi al tiuj, kiuj vidiĝas kiel etapoj de irado: estos do por mi neeble memori ĉiujn eventojn kaj, kiel ili meritus, ĉiujn homojn, kiuj efike kontribuis al la plenumado de la diversaj iniciatoj.
Ĉi-jare ni festas la centan vivjaron de nia asocio. Ni ja scias ke ĝi establiĝis en 1913, kaj la unua prezidanto estis Vasco Giaretta. Tion ni legas en tiutempa revuo, kiu raportas ankaŭ pri la granda propagando jam realigita en la urbo kaj provinco per prelegoj, debatoj kaj kursoj (en kiuj partoprenis ĉirkaŭ mil gelernantoj!). Fakte, la disvastiĝo de Esperanto en la mondo multe pligrandiĝis ekde la jaro 1905, kiam okazis en Boulogne-sur-Mer la unua universala kongreso, dum kiu sepcent diversnaciaj homoj interparolis uzante novan komunan lingvon. Tia eksterordinara sciigo ekscitis la intereson de multaj, inter kiuj poŝta funkciulo el Vicenza, Vasco Giaretta. Li estis do nia pioniro, ĉar, kiel ni legas en alia revuo, ĝuste en 1905 "komencis interesiĝi pri Esperanto".
Certe Giaretta varbis prozelitojn kaj sukcesis estigi areton da homoj. La dokumentita ekzisto de la esperanta movado en nia urbo en 1911 decidigis celebri ties 50-an jaron en 1961, per interregiona kunveno; sed, kiel jam dirite, la "Gruppo Esperantista Vicentino" establiĝis formale nur en 1913.


La simbolo de Vicenza E-Centro

Bedaŭrinde la unua mondmilito interrompas ĉian agadon, kiu tuj poste rekomenciĝas, kun granda deziro de progreso en la paco. La idealoj kaj la lingvo de Zamenhof pli kaj pli trovas aliĝantojn.
En 1920, kiel jam okazinte en Venecio, Padovo kaj Verono, la grupo decidas doni al si veran asocian statuton kaj nomiĝi "Esperanto Grupo Vicenza", kun sidejo ĉe la loĝejo de advokato Franceschini. La nombro de la membroj, inter kiuj konataj profesiuloj kaj eminentuloj, daŭre pligrandiĝas, tiom ke, post iom da jaroj, la sidejo, iĝinte tro malvasta, devis esti translokita en la pli vastajn ĉambrojn de Palaco Gualdi. La karmemora Gianni Franzina, dum multaj jaroj nia prezidanto, skribis en 1977: "Kelkaj maljunuloj ankoraŭ memoras pri la Verda Flago, kiu, dum la lernejaj vesperoj, gajece flirtadis ĉe balkono de domo

Franceschini. Homoj, supren rigardante, interbabiladis konvinkite ke temas pri la konsulejo de nova ŝtateto naskita de la ĵus finiĝinta milito."
En 1930 la grupo restariĝas, verŝajne por konformiĝi al leĝaj dispozicioj, kaj aliĝas al FEI kaj al "Opera Nazionale Dopolavoro". La faŝisma reĝimo superregas, kaj la esperanta movado estas tolerata kiel turisma propagandilo, dum la esperantistoj estas malŝatataj kaj persekutataj en Hispanio, Germanio kaj Rusio, nur pro tio, ke ili estas pacifistoj, ne rasistoj. Nia grupo ageme laboras, tiom ke ĝi sukcesas okazigi en Vicenza, en 1938, la 20-an Nacian Kongreson, en kiu, krom italoj, partoprenas germanoj, hungaroj kaj svedoj. Kongresa temo (kompreneble!): "Esperanto kiel turisma propagandilo"; preleganto: prof-ro Giorgio Canuto, tiama prezidanto de FEI.
Sed nemulte daŭras la kontento pri la atingitaj rezultoj de la agado: ankaŭ Italio alvostiĝas al la aliaj diktaturoj. La faŝismaj aŭtoritatoj dissolvas la grupon, kaj la provinca Katedro estas devigita ĉesigi sian agadon. Multaj skribaĵoj kaj dokumentoj perdiĝas. Unu el la estraranoj, prof-ro Angelo Alverà, estas deportita al Dachau, kie li finas sian vivon, viktimo de la nazia barbareco.
Tuj post la milito, la grupo rekuniĝas kaj trovas taŭgan sidejon ĉe SGMS (Ĝenerala Societo pri Reciproka Helpo), kiu ankoraŭ nun gastigas ĝin. Pluraj prezidantoj sinsekvis aŭ alternis, inter ili Attilio Liotto kaj Galdino Pendin, ankoraŭ viglaj kaj agemaj, kaj du grandaj animantoj: Gianni Franzina kaj Sergio Gajotto, kiuj nun vivas en nia neforviŝebla memoro. Plimultiĝis la societanoj, regis entuziasma etoso, floris iniciatoj. En epoko pli proksima, en 1994 okazas en Vicenza la 64-a Nacia Kongreso. La aliĝintoj estas 217, el kiuj 26 fremduloj el 8 diversaj landoj. La kongresa temo - "Esperanto por defendo de eŭropa kulturo" - estas pritraktata de preleganto d-ro Werner Bormann, estrarano de UEA, kaj de pluraj samideanoj dum seminarioj kaj renkontiĝoj kiuj alternadas kun vizitoj de la urbo, spektakloj en Olimpia Teatro, koncertoj kaj eĉ esperantlingva diservo. Organizinto de la kunveno estis nia forpasinta prezidanto Sergio Gajotto, kiun ni memoras ankaŭ ĉar li obtenis de la komunuma administracio la titoligon de urba strato laŭ la nomo de L.L.Zamenhof.
Krom la naciaj kongresoj, menciindas ankaŭ la interregionaj kunvenoj okazintaj en Vicenza (en la jaroj 1948, 1951, 1961, 1980) kaj la multaj iniciatoj realigitaj: en 1962, ekzemple, nia "*Comitato gite*" organizadis ekskursojn ĉefe al la proksimaj Aŭstrio kaj Slovenio por pluteni la kontaktojn kun la lokaj E-grupoj; en 1967 establiĝis "Fervojista Grupo" ĉe *Dopolavoro Ferroviario*, kaj en 1970 "Centro por eksterlanda korespondado", kiu disdonadis leterojn alvenintajn el la tuta mondo al la kursanoj, por ke ili komencu ekde la unuaj lecionoj sperti la taŭgecon de Esperanto por internaciaj komunikadoj.
Oni aranĝis periode festajn renkontojn, kun multnombra ĉeesto de parencoj kaj geamikoj, kaj regule partoprenis en iniciatoj de aliaj organizoj, ekzemple "*Fiera del tempo libero*" kaj "*FestAmbiente*". Ni kunlaboris ankaŭ en la aranĝo de "naturalisma oazo" (*Oasi naturalistica di Casale*), apud Vicenza. Grava kontribuo donis nia movado al kunveno en Recoaro Terme organizita de Istituto Rezzara pri "konstruenda internaciismo" (invititoj, inter aliaj, estraranoj de nia grupo kaj eminentaj esperantistoj, kiaj Carlo Minnaja kaj Dino Fabris, tiama ĝenerala direktoro de IIE). Memorindas ankaŭ lastatempa kultura iniciato: la traduko en Esperanton de rakontoj en bildstrioj, kiaj Rat-man, Diabolik, kaj Lupo Alberto.
Internacinivele nia grupo aktivas per multnombraj vojaĝoj kaj per gastamo al samideanoj de la tuta mondo. Menciindas la japana dancistino Sumiko Gotoo, la bulgara operkantistino Maria Angelova kaj Anatoli Ionesov, fondinto de Internacia Muzeo pri Solidareco kaj Paco en Samarkanda.
Zorgema kaj konstanta, nun kiel pasintece, la instrua agado. La loka Katedro de IIE organizas ĉiujare diversnivelajn kursojn, en la urbo kaj en aliaj lokoj de la provinco, kaj informajn renkontiĝojn ĉe lernejoj kaj institutoj.
Mi finas ĉi tie mian sintezan raporton pri la historio de nia grupo dum siaj unaj cent jaroj. Historio de renkontiĝoj, kiuj realigis rimarkindajn kulturajn interŝanĝojn kaj amikecajn rilatojn en la tuta mondo. Kaj tio estas la celo de la esperanta movado.
Ni rapide rigardis la komencan parton de vojo antaŭeniranta senfine. Ni daŭrigas nian iradon laŭ ĉi tiu vojo, subtenantoj de lingva demokratio, konvinkitaj ke nur helpa lingvo, produktita de racio, apartenanta ne al unu popolo sed al la tuta homaro, povas egalrajtigi ĉiun homon kaj valorigi ĉiun kulturon, sen diskriminacioj kaj sen privilegioj. Tial, for de ĉia fanatikeco, sed kun agema espero, ni daŭrigas proponi la uzadon de nia internacia lingvo kaj kredi je nia idealo de frateco, cele al mondo solidareca kaj paca, respektema de la homaj rajtoj kaj de la medio. Utopio, certe. Sed ja utopio estas movanto de homa progreso.

KONGRESE

Castellaro 2013

Ermigi Rodari

L'impostazione data da qualche anno al nostro congresso nazionale continua a dare risultati positivi anche se cala un po' il numero degli iscritti, che comunque sono stati 250 di ben 34 nazioni (un record, anche se due hanno dato forfait per problemi di visto). Di nuovo gli stranieri erano i più numerosi. Parecchi sono i motivi che concorrono al successo di un congresso: il luogo, la soluzione logistica, il programma culturale, le gite, le personalità presenti, l'impegno di un Comitato Organizzatore che sia efficiente. E qui occorre un caloroso ringraziamento ai suoi membri e specialmente a L. Brazzabeni, coniugi Perna, Nicola Minnaja, B. Mandirola. Quest'anno la sede scelta era Castellaro, un borgo medioevale abbarbicato su un monte subito alle spalle di Sanremo: i suoi 1300 abitanti non avevano mai visto tanti stranieri insieme e si sono sentiti interessati e coinvolti, sindaco in testa e spesso presente. La struttura ospitante, un Residence a quattro stelle con campo da golf e piscina, più che adeguato, ma era quasi inevitabile che, a fronte di prezzi molto scontati, abbia poi cercato di risparmiare sul cibo con un monotono ricorso a materie prime di basso costo. Sette gli ampi saloni del Centro Congressi: tutti, meno lo "Zamenhof", poi dedicati a storici grandi esperantisti legati alla Liguria: Bicknell, Orengo, Fasce, Briano, Formaggio e Sartorio. Di qualità e ricco il programma culturale, come al solito con cura allestito dal dott. Nicola Minnaja: due seminari condotti dal noto prof. Gubbins (su *"Eŭropa kulturo tra Esperanto*") e da M. Nuyanzina (su *"Historio, teorio kaj praktiko de tradukado*"). Un terzo, su come condurre i corsi di linguistica, affidato alla nota insegnante Katalin Kovàts. Ben tre i corsi di Esperanto: di base, di perfezionamento e per esperti. Parecchie conferenze: una è stata tenuta dal prof. Tonkin su Shakespeare. Una particolare citazione al pro-

gramma del prof. Davide Astori, con le sue "Meditazioni notturne": un approfondito esame critico del pensiero di Zamenhof anche in campo religioso.
Nel dibattito sulla cultura europea presente il sindaco di Mazara del Vallo, Nicolò Cristaldi, che è stato nominato Membro Onorario della FEI e che ne è stato il "mattatore" esponendo quanto ha fatto ed il suo pensiero su parecchi aspetti e problemi sociali legati alla integrazione, non solo culturale.È per la società multiculturale e quindi per l'Esperanto, che spera sempre più presente a Mazara. Tre gli intrattenimenti teatrali e alla sera i concerti tenuti da vari complessi o cantanti tra i più noti nel mondo esperantista. Di essi tre tenuti nella piazza principale di Castellaro coinvolgendo anche i residenti. Un ricco ed accurato servizio librario, la presentazione di libri, i programmi notturni dei giovani, con anche una nottata enogastronomica internazionale, hanno completato il quadro di questo riuscito congresso. Le escursioni hanno avuto per meta quanto di meglio è visitabile da Montecarlo a Genova e come al solito hanno fatto concorrenza agli altri programmi contemporanei.
Buono l'interessamento dei media: articoli su La Stampa e Il Secolo XIX. servizio e interviste di RAI TV 3, oltre a giornali e radio locali
Uno dei programmi fissi dei congressi è stata la sua inaugurazione condotta dal presidente con riferimento al tema di questo anno, che era "Comprendersi per rispettarsi". Egli ha pure letto messaggi inviati dai sindaci di Sanremo e Fai della Paganella, prossima sede del congresso 2014, e dato la parola a quello di Castellaro, dott. A. Catitti, che ha rivolto un caloroso benvenuto e un apprezzamento convinto sull'Esperanto. I successivi interventi di un'assessore, di Laura Brazzabeni e Nicola Minnaja hanno preceduto la prolusione ufficiale, tenuta con maestria e consumata oratoria dal famoso prof. Humphrey Tonkin, che ha catturato l'attenzione di tutti ricamando sul tema congressuale, distinguendo fra comprendere ed essere in accordo, sottolineando l'importanza della tolleranza e della difesa della cultura locale. Sono seguiti i saluti di parecchie associazioni di categoria, italiane e non, e poi dei rappresentanti delle nazioni presenti. Ostacoli tecnici ci hanno impedito di stonare l'inno e di dare un'impressione di settarismo agli ospiti presenti. Si rimedierà cantandolo fra noi alla chiusura. Così è già meglio.
Un altro momento importante è stata l'annuale assemblea dei soci della FEI, non molto frequentata, che ha toccato pochi argomenti. La relazione morale, e poi la finanziaria, hanno dato il via per discutere su quanto avviene a Mazara del Vallo: fatti e risultati senza dubbio positivi e di valore ma frutto più che altro del lavoro di "volontari" esterni, senza il sorgere di un vero interesse locale, oltre al sostegno notevole del sindaco. Su ciò ha insistito la s-ino Lipari, mentre la s-ino Vilisics ha giudicato erronea l'impostazione di tutta l'iniziativa, e l'impiego di volontari stranieri. Il s-ano E. Rodari ha giudicato incoerente e inaccettabile l'enorme deficit finanziario d'una iniziativa che sembra un pirotecnico presente senza un concreto futuro in loco. Interventi in difesa dell'operato da parte di chi invece lo porta avanti, il presidente Grassini in primis, convinto che si tratti di una valida scommessa. Dopo aver constatato il fattivo aiuto della FEI ai gruppi e per l' informazione, resi possibili grazie al 5X1000, si è passati al bilancio con una serrata critica negativa, nella forma e nella sostanza, da parte del dott. Polerani. Il s-ano Rodari, pur confermando che certi aspetti formali sono stati rispettati e che nessuno dubita sulla serietà dei responsabili, ribadisce che lo pseudobilancio è solo abborracciato alla meno peggio, compatibilmente con il poco tempo ed i dati a disposizione. Prima causa la situazione caotica creatasi in sede precedentemente, sotto diversi aspetti, e che, ora che sembrava andare verso una normalizzazione, rischia di precipitare di nuovo.
Ecco il risultato della votazione delle due relazioni, di nuovo con un significativamente basso numero di partecipanti;
Votanti 84 con 2 nulle. Relazione morale: 71 sì e 11 no. Relazione finanziaria: 62 sì e 20 no. Un risultato che deve far riflettere per l'alto voto a sfavore (per la finanziaria ha addirittura toccato quasi il 25%) per il secondo anno consecutivo. È da notare che a favore votano quelli che con cognizione sono d'accordo ma anche quelli, più numerosi, che, poco informati, seguono l'onda giustamente, mentre sono a sfavore solo i contrari a torto o a ragione convinti.
Il presidente Grassini ha pure consegnato il Premio Conterno al Gruppo di Pescara in riconoscimento della sua attività, ed anche informato che il Premio Zamenhof rischia un ridimensionamento della cerimonia per difficoltà di sponsorizzazione.

KONGRESE

Impressioni di un giovane *komencanto*

Alberto Muzzu

Castellaro... che dire, Castellaro è stato per me il luogo dell'esperanto. Quest'utopia, questa Speranza senza un territorio che si sposta per il mondo mi ha in qualche modo lasciato un po' di verde nel cuore che credo essere sua terra natia. Non ho visto vecchi né anziani al congresso, ma solo occhi di persone giovani e curiose, affamate di un mondo che c'è ancora sepolto sotto cumuli di parole oramai impoverite, che hanno perso ogni potere mutando significato o scomparendo per lasciare il posto a vocaboli superficiali, lontani da ciò che siamo.
Ho visto scorrere, veicolate da un linguaggio piacevole, parole semplici e fresche, prive di pregiudizi o filtri sociali; il rispetto per l'altro che viene annientato da allocutivi e titoli nelle società odierne viene sostituito in esperanto da un umano e vivo tu. Attraverso un tale linguaggio l'altro è già un fratello e senza dover abbattere nessuna barriera sociale si arriva dritti al cuore del nostro interlocutore. Questo è accaduto a Castellaro: un incontro tra fratelli. Ho incontrato persone che già conoscevo senza mai averle viste, persone mai incontrate prima che si riuniscono per creare qualcosa di nuovo o meglio per riportare alla luce un qualcosa di eterno insito nei nostri cuori.
Dopo esser tornato, come spesso accade, ho compreso il motivo della partenza: dovevo vedere questo movimento vitale che spinge persone che credono in qualcosa a riunirsi. Questo è uno dei punti di forza di questa Speranza, non la semplicità della grammatica, ma quel fuoco che alimenta la voglia d'incontrarsi senza fini secondari. L'altro punto di forza è la democrazia di cui questa lingua, non ancora violentata da menti mediocri, si fa portatrice.
Da *komencanto* ho inoltre avuto la possibilità di sperimentare discorsi puramente utili e basilari, privi del chiacchiericcio che spesso si genera avendo pieno possesso della lingua. Sottolineo questo fatto per delineare meglio un continuo sforzarsi di comprendere l'altro cosa che accade spesso con il nuovo e di rado con il vecchio o il quotidiano. Un po' come nei viaggi, è facile meravigliarsi o provare una sensazione

La Bicicletta Esperantista che è uscita dalla gabbia e continua l'ascesa sfidando le avversità

perturbante di fronte alla novità, ma lo sforzo sta nel meravigliarsi ogni giorno di fronte alle piccole cose che la vita mostra a chi vuol vedere.
"Nel giorno della fine non ti servirà l'inglese" dice Battiato, be' forse nemmeno l'esperanto, ma di certo servirà un cuore come quello delle persone incontrate al congresso.
Insomma, quest'incontro ha accresciuto la mia voglia di migliorare, di comprendermi e rispettarmi per portare la vita a un livello più alto e vicino a quegli ideali che hanno fatto nascere in un uomo come noi un movimento chiamato Esperanto.

Mia unua Nacia Kongreso

Paola Tosato

Mi jam partoprenis en kelkaj internaciaj kongresoj kaj en aliaj E-renkontiĝoj, sed ĉi tiu estis mia unua Nacia Kongreso.
Sabaton la 3a de augusto estis la alveno: mi alvenis al la Hotelo Golf Resort, la kongresejo ĉe Kastelaro, je la 13.30 per trajno; posttagmeze mi nur ripozis ĉar mi estis vere laca.
Dimanĉon matene estis la solena inaŭguro dum kiu ĉeestis la Loka Komitato de la Kongreso kaj la urbestro de Kastelaro; la komitato diris ke ĉijare partoprenis 34 nacioj, la urbestro donis bonajn vortojn favore al esperanto kaj diris ke li estis tre kontenta gastigi tian eventon. Posttagmeze estis mia unua ekskurso, al Sanremo: tie ni vizitis malnovan islaman preĝejon, la antikvan sidejon de la Kazino kaj la novan, Teatron Ariston kie okazas ĉiun jaron la fama Festivalo de la Kanzono; poste ni supreniris sur la montaro kaj trairis la tiel nomatajn "*carruggi*", supreniraj vojoj tre mallarĝaj, fine ni haltis sur teraso por rigardi la mirindan panoramon.
Lundon mi restis la tutan tagon en la kongresejo do mi elektis seminarion pri tradukado en kiu la prelegantino rakontis la historion de tradukado de la originoj ĝis nuntempo kaj fine konturis la trajtojn kiujn devas havi bona traduko. Posttagmeze estis teatraĵo pri Galileo kaj vespere mi aŭskultis la koncerton de Manuel pri italaj kaj internaciaj kantoj, malnovaj kaj nuntempaj.
Mardon okazis la tuttaga ekskurso al Princlando de Monako: matene ni promenis sur la stratoj de la urbo pasante tra belegaj ĝardenoj kaj vidante la Katedralon en kiu geedziĝis Grace Kelly kun Princo Ranieri. Je la 12a ni vidis la ŝanĝon de la gvardio kaj, post la tagmanĝo, ni iris al Montekarlo, fama kvartalo riĉa je luksaj hoteloj, en kiu estas la Kazino.
Posttagmeze ni vizitis Nicon kun ĝia haveno kaj ĝiaj karakterizaj stratetoj, kaj fine ni haltis en Mentono, kie mi gustumis glaciaĵon je lavando.
Merkredon okazis alia tuttaga ekskurso, al Ĝenovo: matene ni vizitis la faman akvarion kiu kolektas ĉiujn speciojn de fiŝoj; postagmeze ni promenis tra la malnova urbo kaj ni vidis placojn, preĝejojn, palacojn; vespere okazis la Internacia Vespero dum kiu mi prezentis pecon de ventrodanco, estis ankaŭ prezentado de kantoj, de poeziaĵoj, kaj de nepala danco.
Ĵaudon mi dediĉis la tutan tagon al ekzamenoj, fakte mi estis membro de la komisiono pri ekzamenoj de 2a kaj de 3a.
Vendredon matene okazis la lasta ekskurso al Ĉervo, la plej malgranda vilaĝo el la provinco de Imperia, kaj al Imperia kie ni vizitis la Muzeon de olivoleo de Fratoj Carli kaj fine ni gustumis la lokajn produktojn.
Posttagmeze mi partoprenis en la lasta sesio de la seminario pri tradukado en kiu la prelegantino resumis la paroladojn faritajn dum ĉiuj sesioj.
Sabaton estis la foriro kaj mi alvenis hejmen vespere.
Konklude mi povas diri ke ĉi tiu kongreso estis vere mirinda sperto pro diversaj kialoj: mi vizitis por la unua fojo Ligurion kiu kunligas du diversajn aspektojn, la montetojn kaj la maron, do estas vere bela regiono, vizitinda; mi aprecis la lokan kuirarton, de kiu mi elkovris la olivoleon kaj la olivojn, originajn de Arma di Taggia, vilaĝeto proksima al Kastelaro; finfine mi ŝatis la internacian etoson kiu estis dum la tuta kongreso.

KONGRESE

Sin kompreni por sin respekti*

Humphrey Tonkin

La esprimo "Konu vin mem" konsistigas bazan principon de la civilizo. Ĉizita en la antaŭkorto de la Templo de Apolono en Delfo estis, laŭ la greka verkisto Pausanias, la instrukcio *gnothi se auton*, kiun la romianoj tradukis kiel *Nosce te ipsum*, Konu vin mem. Fakte tiu aforismo vaste cirkulis en la greka kaj romia epokoj kaj estis atribuita al tuta amaso da pensuloj. Platono ĝin uzis en pluraj siaj dialogoj, asertante, ke temas pri antikva eldiro; Aristofano ĝin mokis – kaj eĉ Polonio, en Hamleto, per sia aserto, ke oni restu honesta al si mem, kvazaŭ ĝin eĥas. Kaj oni povus nomi ĝin baza principo de la moderna disciplino de psikologio, por ne paroli pri la kognaj sciencoj ĝenerale.

Kaj jen ĝi reaperas en ankoraŭ plia formo kiel la temo de la nuna kongreso.

Sin kompreni por sin respekti…. Certe la intenco de la kongresaj organizantoj estis emfazi, ke reciproka sinkompreno kondukas al reciproka sinrespekto – do "reciproke kompreni por reciproke respekti", sed en tiu ĉi parolado mi volas esplori ĉefe la unuan parton de tiu ekvacio: la kapablon kompreni nin mem, ĉar sen tiu kapablo ne eblas plene kompreni kaj respekti aliajn homojn; kaj nur per efika rilato kun aliaj ni povas reciproke konstrui kaj konservi la civilizitan vivon. Tiu, kiu konas sin mem, atingas la komprenon, ke en iuj okazoj cedo al la kolektivo bonigas la farton de ĉiuj. Kredo je tiu kolektiva bonfarto animas la verkojn de multaj niaj plej grandaj pensuloj kaj verkistoj, de Sofoklo al Ŝekspiro, kaj de la grekaj filozofoj ĝis la hodiaŭaj teoriistoj pri demokratio. Ŝekspiro, ekzamenante la homan naturon, trovis en ĝi du aspektojn: la animalan (ni ĉiuj estas animataj de la kapablo moviĝi, nin nutri, nin reprodukti), kaj la spiritan (malkiel la bestoj, la homo estas plene konscia pri sia ekzisto, povas rezoni pri ĝi, povas rekursive esplori la proprajn reagojn, kaj estas libera – ene de certaj limoj – elekti la vojon, kiun li aŭ ŝi sekvas). Malfacilas kompreni aliajn se ni ne konas nin mem, kaj manko de kompreno de aliaj facile kondukas al kolapso de civilizitaj valoroj.

"Kompreni" estas komplika vorto – multe pli komplika ol ĝi unuavide ŝajnas. Zamenhof, kies internacia lingvo Esperanto estas la kialo de la hodiaŭa renkontiĝo, emfazis la gravecon unuavice de lingva kompreno. Vidante la problemojn rezultantajn el nekompreno inter la parolantoj de diversaj lingvoj, ekzemple en sia naskiĝloko Bjalistoko, Zamenhof, jam antaŭ unu jarcento kaj triono, kreis facilan sed plene esprimkapablan lingvon, kiun ĉiuj homoj adoptu kiel aldonan interlingvon por ebligi komunikadon inter diverslingvanoj. Li kredis, ke, se almenaŭ la homoj komprenus unu la alian, ili povus eldiskuti siajn malkonsentojn kaj trovi manieron ilin forigi. Krome, Esperanto aŭ iu ajn komuna lingvo alportus amason da aliaj avantaĝoj – en komerco, en scienco, en vojaĝado, en edukado. Kaj Esperanto havas tiun avantaĝon, ke ĝi metas ĉiujn homojn sur la saman nivelon, ĉar ili ĉiuj estas devigataj ĝin akiri kiel duan lingvon.

Tiu ĉi ne estas okazo por rerakonti la historion de Esperanto, nek la argumentojn por lerni ĝin: la granda plimulto de mia aŭskultantaro jam konas tiujn aferojn. Ni tamen konstatu, ke multaj adeptoj de Zamenhof iom tro naive interpretis lin kiam li parolis pri "kompreno"; kaj li mem, kaptita inter la neceso krei amasmovadon kaj la deziro nuanci sian mesaĝon, ne ĉiam alfrontis la miskomprenojn. Tiuj naivuloj supozis, ke simpla

alpreno de Esperanto, tiu "lingvo de Doktoro Esperanto", aŭtomate resanigos jarmilojn da malamikeco, ke regos ĉie "kompreno". Sed kompreni ne estas interkonsenti: ni povas bone kompreni la vidpunkton de alia homo kaj samtempe kompreni, ke tiu vidpunkto estas rekta minaco kontraŭ ni. En la iama Jugoslavio, ekzemple, ambaŭ flankoj sin komprenis per la tiama serbokroata lingvo; en Sirio oni interkompreniĝas per la araba; same en Libio; same en Egiptio. Komprenante unu la alian, oni eltrovas, ke oni havas diversajn celojn kaj intencojn – kio rezultigas nur pli fortan kvereladon, pli fortan interbataladon.

Tiu vorto "kompreni" signifas, en tiu ĉi kunteksto, pli multon ol simplan lingvan komprenon.

La parolantoj de Esperanto – almenaŭ tiuj, kiuj meritas nian plenan respekton – konscias, ke, por esti kompleta esperantisto, necesas alproprigi pliajn valorojn, pliajn interkonsentitajn principojn, ol nur la simplan kredon, ke internacia lingvo alportas, kvazaŭ per simpla artimetiko, internacian pacon.

Unue kaj ĉefe, necesas kompreni sin mem, sian propran sintenon al la mondo, eble eĉ tiun aparte malfacile rekoneblan egoismon, la firman konvinkiĝon, ke oni mem pravas kaj aliaj ne. Tia malbela konvinko pri propra pravo kondukas al neekzameno de la faktoj, al manko de memkritiko. Eble oni povus diri, ke necesas ne nur paroli Esperanton, la lingvon de paco, kun aliaj, sed ankaŭ paroli ĝin kun si mem – do, reekzameni la proprajn valorojn per novaj lingvaj valoroj. Plene kompreni estas koni la proprajn limojn kaj limigojn.

Parenteze: ĉu vi rimarkis, ke unu el la malfacilaj gramatikaj aspektoj de la lingvo Esperanto estas ĝusta utiligo de la refleksiva pronomo "si"? Eble tiu necerteco gramatika fontas el malklara sento de la refleksivaj konsekvencoj de niaj propraj agoj kaj kredoj. Alia malfacila lingva aspekto, almenaŭ por parolantoj de multaj lingvoj, estas ĝusta utiligo de la difinita artikolo "la" – tiu magia vorto, kiu distingas inter unikaĵoj kaj ĝeneralaĵoj, kaj atribuas jen gravecon, jen malgravecon. Por parolantoj de la angla lingvo, kiuj kutimas skribi la unuan personon per majuskla "I", eble utilas foje skribi ĝin per minuskla "m"…. Eĉ tiuj ŝajne bagatelaj diferencoj, se aplikataj konscie al la propra persono, povas instigi certan humilecon. Ĉu ne estis la granda franca filozofo Montaigne, kiu iam diris, ke la plej granda parto de la problemoj de la mondo estas atribuebla al aferoj de gramatiko?

Iuj fruaj esperantistoj supozis, ke, tra la jaroj, Esperanto fariĝos ĝenerale adoptita, tiel ke la unuopaj regionaj kaj naciaj lingvoj estos iom post iom anstataŭataj de Esperanto, kiu do fariĝus universala lingvo. Sed Zamenhof, male, bone komprenis, ke, se homoj estas nature gregemaj, nature kunlaboremaj, ĝuste ilia kapablo per libera elekto distingi sin de aliaj personoj estas profunde homa konduto. Pro tio li laŭdis patriotismon, la senton aparteni al difinita homgrupo, sed denuncis naciismon kaj ŝovinismon, la emon kredi sin supera al aliaj. La homa raso vivas en vasta reto de samecoj kaj diferencoj, delikate ekvilibra sed facile rompebla. Ni ĉiuj formas nian identecon per serio de elektoj inter la kolektivo kaj memo. La homoj de difinita parto de la mondo havas siajn proprajn morojn; tiuj de aliaj mondopartoj alimaniere imagas sin. Tiu diverseco de lokaj kulturoj kaj moroj riĉigas la homan specion – samkiel niaj unuopaj decidoj prezenti nin mem al aliaj per difinitaj trajtoj kaj kondutoj donas al ni senton de identeco kaj memfido. La lingvo estas unu elemento de tiu sento de identeco.

Esperantistoj prave argumentas, ke lingva diverseco en si mem estas bona afero, ĉar ĝi konservas kaj fortigas alternativajn manierojn loĝi en la mondo. Unu el la grandaj avantaĝoj de paca toleremo estas tio, ke ni rajtas havi eĉ plurajn identecojn samtempe. Mi mem, naskita brito kaj loĝanta en Usono kiel usona civitano, estas permesata de la relative tolerema socio en kiu mi vivas, samtempe esti brito kaj usonano – kaj samtempe esti universitatano, literaturamanto, eĉ esperantisto, sen la neceso elekti inter tiuj diversaj esprimiĝoj de mia propra memo. Dum milito oni devas decidi inter identecoj: ne eblis esti serbo kaj kroato samtempe en la kolapso de Jugoslavio; ne eblas esti simpla islamano en la sektaj kaj etnaj kvereloj de la nuntempa Sirio. Dum paco, oni povas trankvile alproprigi plurajn identecojn kaj toleri ilin en aliaj.

Kompreni aliajn kaj kompreni nin mem implicas kompreni ankaŭ la rilaton inter individuo kaj kolektivo en spirito de reciproka respekto. Fakuloj pri lingvoj atentigas, ke lingvoj estas uzataj ne nur por transdoni informojn sed ankaŭ por ludi: por krei esprimojn, parolturnojn, unikajn uzojn, kiuj, ene de la kolektiva kompreno de la lingvo, ebligas al ni montri niajn unikajn individuajn trajtojn, distingi nin mem de aliaj. Foje la kritikantoj de Esperanto asertas, ke

Esperanto kondukas al senkolora sameco, al dezerto de artefarita esprimado. Sed ni, kiuj parolas la lingvon, scias, ke ĝi ebligas unikan sinesprimiĝon.
Kaj tio kondukas al plia konstato – ke kiam ni parolas pri "lingva kompreno" aŭ "lingva interkompreniĝo", ni tuŝas ne nur la komplikan naturon de "kompreno" sed ankaŭ la komplikan naturon de "lingvo". Lingva diferenco estas neta pozitivo en mondo en kiu ĉiu homo posedas pli ol unu lingvon, do, ekzemple en cirkonstancoj en kiu italo ĉehejmas en sia loka lingvo kaj samtempe en la norma itala (kaj prefere ankaŭ aldonas plian lingvon). Tamen, kvankam tia lingva diferenco estas pozitivo, unulingveco estas negativo.
Kiel usonano kaj samtempe fakulo pri lingvistiko, mi povas paroli pri tiu demando kun certa aŭtoritato. Lingvo estas pli ol komprenilo aŭ eĉ ludilo; ĝi estas ankaŭ socia institucio. Por prosperi en la moderna Italio, necesas koni la italan. Tiu kiu naskiĝas en Italio aŭ elektas loĝi en Italio vole-nevole devas lerni elturniĝi per la itala. Nu, jes, ekzistas esceptoj, kaj eĉ kontraŭargumentoj, sed esence la itala estas socia kaj politika institucio en tiu ĉi lando. En Usono, lando de enmigrado kaj de ege komplikaj kulturaj radikoj, la angla lingvo tamen dominas. Ĝi estas instrumento de ŝtata kaj institucia potenco, do multe pli ol simpla interkomprenilo.
Bone informita esperantisto scias, ke oni povas misuzi lingvon por diskriminacii – ne nur por inkluzivo sed ankaŭ por ekskluzivo, kaj ke tio abunde okazas – certe en Usono, verŝajne en Italio. Bedaŭrinde la angla lingvo pli kaj pli uziĝas tiumaniere ne nur en Usono kaj Britio kaj aliaj anglalingvaj landoj, sed ankaŭ eksterlande. La postmoderna interplektiĝo de merkatoj kaj ekonomioj donis al la angla lingvo grandan impulson, en kiu ĝi minacas la situacion de lokaj kulturoj. Mi lastatempe partoprenis simpozion de fakuloj el diversaj partoj de la mondo, kiu ekzamenis la rapidan kreskon de la angla lingvo kiel lingvo de instruado en universitatoj en ne-angleparolantaj landoj. Kiel ni vidis ĉi tie en Italio, en cirkonstancoj en kiuj politikistoj kaj aliaj volas, ke la universitatoj en la propra lando superu tiujn de aliaj landoj, iliaj profesoroj estu pli renomaj ol aliaj, kaj iliaj studentoj povu internacie moviĝi (dum Italio profitas el la mono alportita de eksterlandaj studentoj), la angla lingvo komencas transpreni rolojn antaŭe rezervitajn al la itala. Mallonge dirite: la lingvo de la merkatoj, alloga, utila, riĉiga, sed rilate valorojn neŭtrala se ne negativa, forpuŝas la lingvon de la itala kulturo, spirite riĉa, unike dotita, kun ĉiuj apartaj kulturaj valoroj, kiujn ĝi alportas.
Sed tiu ĉi estas demando traktebla nur per tro da detaloj ol eblas nun. Ni restu ĉe la kerna punkto….
Post la lanĉo de Esperanto en 1887, Zamenhof elektis sekvi du vojojn aparte gravajn. Unue, li emfazis, ke Esperanto ne estas lia lingvo, sed la lingvo de kolektivo: li komprenis bone, ke lingvo estas socia institucio, valora ĉefe kiel ligilio inter homoj. Eĉ oni povus argumenti (kiel ja ofte argumentas la lingvistoj), ke lingvo parolata de unu homo ne estas lingvo, sed nur lingva sistemo: por esti vera lingvo, tiu lingvo devas havi sian propran komunumon.
Due, Zamenhof, post la lanĉo de la lingvo, fariĝis ĉiam pli scivolema pri la elserĉo de homaj ecoj ne nur lingvaj sed ankaŭ spiritaj. Tiujn ideojn li evoluigis en sia "Homaranismo", klopodo alvoki la homojn esplori siajn komunajn homajn ecojn, siajn komunajn kredojn, siajn komunajn valorojn. Necesis ne nur lingva kompreno (tiel sugestis Zamenhof), sed ankaŭ spirita kompreno. Bedaŭrinde, se la lingvo prosperis, ne prosperis tiu alvoko al la plej pozitivaj elementoj en la homa civilizo: Homaranismo ne gajnis multajn adeptojn, ne ĉesis miskomprenoj, ne ĉesis militoj. Eĉ male….
Ni revenas do al nia komencopunkto: "sin kompreni por sin respekti." En Esperanto ni posedas unikan ilon por kompreni nin mem kaj kompreni aliajn homojn en spirito de reciproka respekto. Pro Esperanto ni komprenas, eble pli bone ol multaj aliaj homoj, la negativajn konsekvencojn de lingva malegaleco. Ni uzu tiun nian unikan lingvon por pli bone kompreni aliajn homojn kaj iliajn aspirojn, por pli bone kompreni nin mem, kaj fine por krei tiun novan komprenon, kiu entenas nin kaj aliajn en komuneco de kompreniĝo. Nia celo estu kreo de pli tolerema kaj pli malferma mondo, kiu respektu kulturajn diferencojn kaj estimu la plej grandajn aspirojn de la homa spirito.
Notu, ke mi parolas ne pri kompreno sed pri kompreniĝo. En la sufikso –iĝ, tiu simpla sed profunde komplika gramatika kaj semantika elemento, kuŝas granda saĝo. Tiel certe pensus Michel de Montaigne – kaj, post momento da sinekzameno, tiel certe pensus saĝa esperantisto.

*) Festparolado ĉe la 80a Itala Kongreso de Esperanto.

INFORM@DIKO

Interreta estonteco de nia revuo

Daniele Binaghi

Finfine, ankaŭ nia amata revuo trovis spacon en interreto: ĉe la adreso http://www.esperanto.it/rivista (www.esperanto.it/revuo/, se vi preferas la Esperantan version), troveblas retejo, kiu prezentas la revuon mem kaj ĝiajn enhavojn. Ne ĉiujn enhavojn, pro du kialoj kiujn ni vidos poste, sed ja iujn. Kaj tio estas jam granda rezulto. Ĉar disponigi en interreto kaj AL interreto (fakte, al retserĉiloj kiel Google) tekstojn pri kaj en Esperanto signifas transiri la paperajn kaj poŝtajn barilojn de la revuo, kaj ebligi al homoj trovi tiujn informojn pli facile, kaj eĉ pli rapide.
La retejo, do. Ĝia stilo estas ege simpla, eĉ iom malnova laŭ apero, sed kopias tiun de la papera fratino, kiu ne tiom multe ŝanĝiĝis dum la lastaj jardekoj (ĝi fariĝis pli pura kaj klara, jes, sed ĉiam konservante la tradiciajn trajtojn). Ĉe la supra parto, granda flageca butono permesas facile pasi de la itala al la Esperanta versio, kvankam kompreneble la enhavoj de la artikoloj ne estos aŭtomate tradukitaj. La enira paĝo prezentas la plej novan artikolon, dum ĉe la maldekstra flanko estas listigitaj artikoloj, kategorioj kaj revuoj, laŭ iliaj eldonsezono kaj noveco. Revuoj estas prezentitaj pere de ilia kovrilo, kovrila resumo, enkonduko kaj de la listo de artikoloj, kiuj estis publikigitaj en tiu numero kaj ankaŭ enretigitaj. Oni povas komenti ĉiun revuon kaj artikolon, kaj tio ebligas starigi diskuton pri la enhavoj, diskuto kiu ege malfacilus (kaj malrapidus) per la revua poŝta rubriko. Laŭ la intencoj, eblos ankaŭ elŝuti la tutan revuon laŭ PDFa formo. Kaj, kompreble, ankaŭ estas aldonaj paĝoj kun informoj pri la historio de la revuo kaj pri Esperanto mem, kun listo da interesaj ligiloj al aliaj paĝoj kaj retejoj, kaj kun ebleco kontakti la redakcion de la revuo, por doni komentojn, riproĉojn aŭ konsilojn.
Tre grava kaj nepre necesa ilo estas la ena serĉilo, kiu ebligas traserĉi artikolojn kaj/aŭ revuojn; la rezultoj de tiu serĉo estas klare montritaj en paĝo, kiu iel similas al tiuj de Google, montrante la parton de la artikolo/revuero kiu enhavas la serĉitan tekston, por faciligi la komprenon ĉu temas aŭ ne pri tio kion oni serĉis.
Jam pli ol 50 artikoloj disponeblas en la retejo, kaj informoj pri preskaŭ 40 revuoj. Sed la historio de "l'Esperanto" estas bonŝance tre longa, kaj la intenco estas malrapide aperigi ĉiam pli da tekstoj, revuoj, informoj. La ĉefa problemo estas ke oni bezonas helpon de volontuloj: se ĉiuj homoj, kiuj publikigis ion en la revuo, povus enretigi siajn revuerojn, la afero ege rapidiĝus; sed, bedaŭrinde, ĝis nun ege malmulte kontribuis, do eĉ se la retejo ekzistas de multaj monatoj,

La retejo vin bonvenigas per sia plej nova artikolo

Multaj artikoloj jam aperas en la retejo, sed la plejmulto ankoraŭ ne

la kvanto de artikoloj ne pligrandiĝis proporcie.
Krome, kiam la projekto estis proponita al la estraro de IEF, ĝi decidis permesi ĝin, sed petante ke oni ne enretigu revuojn antaŭ unu jaro el ilia apero: oni timis ke la ebleco elŝuti novajn revuojn el la reto kontribuus al la malmultiĝo de homoj kiuj daŭre deziras pagi la jaran kotizon al la itala asocio. Mi ne vere konsentas kun tiu ideo, ĉar mi opinias ke esperantistoj ne vere aliĝas nacian asocion nur por ricevi ties revuon; sed la vera problemo estas ke parto de la informoj, kiuj aperas en la revuo, estas pri venontaj okazintaĵoj, kaj disponigi tiujn informojn en la reto permesus ke ili pli disvastiĝu; se oni atendas unu jaron, tiaj informoj ne plu estos aktualigitaj, do oni perdos tian eblecon.
Certe la retejo povus esti plibonigita, sed tio indos nur kiam pli da enhavoj estos disponeblaj kaj pli da uzantoj ĝin vizitos kaj traserĉos. Ĉu tio okazos, dependas de ni ĉiuj.

Duafoje Nicola Ruggiero gajnas UK-poezian premion

Antaŭ tri jaroj Nicola Ruggiero, juna esperantisto, jam plurfoje estrarano de IEJ, nuntempe vivanta en Islando, gajnis la unuan kaj duan premiojn de poezia konkurso de UK. Kiam oni gajnas ĝin, oni ne rajtas partopreni en ĝi por la venontaj tri jaroj. Nicola post tri jaroj sendis denove kromajn poemojn kaj... gajnis denove: la unua kaj tria premioj, kiujn ni publikigas ĉi-malsupre. Baldaŭ zorge de Mondial estos eldonita de UEA volumon kun ĉiuj premiitaj poemoj.

Okazis iam

Okazis iam ĉe la mateniĝoj
ke mi nur randis side ĉe la lito
rigardis ĉion, ĉirkaŭ mi, sengusta.
Mi mortis, kun aliaj kadavraĉoj
mi kredis atingita jam la vivon:
salajro kaj loĝejo kaj manĝaĵoj,
kaj ĉio brakumata de l' vakuo,
mi iom sentis, mi neniom amis,
kaj nul signifis, kaj nenion celis.

Okazis tiam ke mi vundis vorte,
forlasis revojn kaj mil ambiciojn,
forgesis ĉarmi kaj rideti iel,
mi volis formortigi mian patron
kaj ĉiun kiu ne samopiniis,
ĉar ĉiuj dioj kaj esperoj mortis,
jen mi sen li, sen ŝi kaj for de ĉio,
kun Dylan Thomas sur la lipoj vinaj,
kor' mia dezertiĝis en mallumo.

Mi sidis rande de la fenestrego
direkta al la nordo, kaj fumaĉis,
mispensis pri la vivo, pri la sorto,
rimarkis ke mi iam povis flugi
same leĝere kiel fum' cigareda
kaj l' emo salti, sekvi la ventegon
tentaĉis emocie kaj altire:
sed mi stultul' forĵetis cigaredon
kaj fek al viv', decidis mi pluvivi.

Nur korvoj du

Ĉi tie eĉ la suno letargias
kaj voĉas tre mallonge al la homoj;
nur korvoj du la sunon liturgias
per ringaj movoj, enaeraj zumoj.

Distie la odoroj de la stratoj
preteras la percepton duondorman;
nur korvoj du plenvekas, inter kotoj,
super silento neĝa, tagon firman.

De tie ili spektas la abundon
kaj grake mokas la neniam satajn
ĉar flugas ili en majestan ondon;

for tie, manoj svingas superŝutajn
salutojn kaj admiras la vivindon:
nur korvoj du plenĝuas lumojn grotajn.

DIRU TRIDEK TRI!

Se il governo prepara la stangata...

Renato Corsetti

...esperantistoj devas pretiĝi traduki la vorton, en tia maniero, kian ankaŭ korea komencanto povas kompreni pri kio temas. Antaŭ multaj jaroj venis al Romo nederlanda profesoro, kiu iom konis la italan. Li malfermis la ĵurnalon, kaj la grandlitera titolo de tiu tago estis "*Approvato il condono*". Li demandis min: "Kio estas '*condono*'?" Mi provis klarigi al li, ke '*condono*' estas speco de 'pardono' por tiuj, kiuj ne pagis impostojn en la pasinteco, kondiĉe ke ili nun pagas parton. Li estis tre surprizita kaj diris: "Se ili ne pagis, oni devas aresti ilin, ne pardoni ilin." Mi pluklopodis diri, ke en Italujo ni preferas pardoni kaj ricevi parton de la sumoj. Li ne estis konvinkita, ke tio estas io farinda en civilizitaj landoj, kaj konkludis per "Mi scias, ke en katolikaj landoj pardonoj estas io religie devigaj." Mi rezignis pluklarigi, ĉar li rifuzis akcepti la koncepton mem, sed ĝenerale oni devas almenaŭ klopodi.

Efektive en ĉiuj kursoj je difinita momento oni havas la ideon: "Ni traduku artikoletojn el ĵurnaloj." Normale la ideo estas tuj flankenmetita, ĉar traduko de la ĵurnala lingvo estas tre malfacila, kaj eĉ por simple kompreni ĝin vi devas ne nur paroli la lingvon, sed esti trempita en la kulturo. Ni vidu kelkajn ekzemplojn el la politika vivo. Ĉiuj citaĵoj el vortaroj venas el la reta vortaro de la itala lingvo Treccani [trekani]. Ankaŭ ĉiuj ekzemplaj frazoj estas prenitaj el ĵurnaloj, krome unu aŭ du evidente inventitaj.

Condono

Laŭ la reta vortaro Treccani ĝi estas: *Remissione di una pena, di un debito... forma di transazione con cui lo stato decide di risolvere, mediante provvedimenti eccezionali, le pendenze tra i contribuenti e il fisco relative ad anni precedenti; analogam., c. edilizio, che ha il fine di sanare condizioni di abusivismo edilizio; c. tombale, nel linguaggio giornalistico, forma di condono che estingue tutte le pendenze.* Praktike ŝajnas al mi, ke la traduko per 'pardono', 'imposta pardono', 'konstru-pardono', 'kompleta pardono' por '*condono tombale*' estas sufiĉe akceptebla. Iom pli teĥnike la vortaro de C. Minnaja [Minaja] proponas ankaŭ 'punformeto', 'punliberigo'.

Stangata

Mi prenas el la sama vortaro Treccani nur tion, kio interesas nin en ĉi tiu okazo: *fatti diversi che, sopravvenendo in modo più o meno inatteso, colpiscano in modo violento causando un grave danno, economico o d'altra natura; per es., un esborso di denaro imprevisto o molto superiore al previsto.* Mi kredas, ke la plej facila kaj komprenebla traduko povus esti 'bato', 'forta bato', 'frapo'. Pli precize Minnaja: stangobato, stangofrapo, bastonbato. Do, la *stangata fiscale* estus "imposta bato". Kompreneble '*stangata*' povas signifi ion tute alian en alia kunteksto: *Il giocatore ha tirato una stangata* = La ludanto forte piedpafis la pilkon.

Mazzetta

Compenso dato o ottenuto in cambio di particolari favori (cfr. bustarella), soprattutto da parte di esponenti politici, di pubblici funzionarî o amministratori, e sim.; tangente imposta da organizzazioni mafiose in cambio della protezione accordata. La plej komprenebla metaforo pri ĉi tio en Esperanto ŝajnas esti tiu de la radiko "ŝmiri". Ankaŭ en la itala oni povas uzi ĝin [*Bisogna ungere il redattore per farsi pubblicare un articolo su 'l'esperanto'* = Oni devas subaĉeti la redaktiston por aperigi artikolon en la revuo

'*L'esperanto*']. Zamenhof en sia profunda orienteŭropa saĝo sciis, ke "Kiu bone ŝmiras, bone veturas." Ĉe '*bustarella*' Minnaja proponas 'ŝmir-mono'. En la hodiaŭa '*La Repubblica*' oni parolas pri '*giro di mazzette*'. Mi dirus "trafiko de ŝmirmono". Kompreneble ankaŭ la kunmetaĵo 'subaĉeti' estas tre uzata en Esperanto: *per entrare all'ospedale ho dovuto ungere/dare una bustarella/dare una mazzetta all'infermiere* = Por eniri la malsanulejon, mi devis subaĉeti/ŝmiri la flegiston. Mi eĉ pensas, ke 'subaĉeti' estas pli ĝenerale komprenebla. Por pli malgrandaj okazoj, kie oni uzas la italan "*mancia*" oni povas uzi ankaŭ "trink-mono/dank-mono".

I grillini/i 5 stelle

Normale oni povus diri: "La parlamentanoj de la Movado 5 steloj" (oficiala nomo). Eventuale iom ironie, tamen, "la gril-uloj" = la uloj (de la partio) de Grillo [Grilo] estus komprenebla por italaj esperantistoj, certe ne por koreoj, kiuj pensus pri homoj, kiuj daŭre saltas. Al koreaj komencantoj, ĉiuokaze, oni devus multe klarigi pri ĉi tiu partio/malpartio. En aliaj okazoj oni devus elekti la tradukon laŭ la kunteksto: "*C'è un grillino, che abita vicino a me.*" = "Estas sekvanto de la Movado 5 steloj, kiu loĝas apud mi."

Muro contro muro

Temas pri esprimo tre uzata lastatempe. La origino estas ĉe "*fare muro [opporre tenace resistenza, anche con la prep. contro: fare m. contro una proposta] contrastare (ø), opporsi (a); muro contro muro [come s. m. invar., impossibilità di dialogare o di accordarsi] incomprensione, incomunicabilità. accordo, comprensione, dialogo.*" Tion oni uzas kiam du partioj ne sukcesas interkonsenti kaj ĉiu defendas sian pozicion kaj ne volas interparoli pri ĝi. "*Alla Camera siamo di nuovo al muro contro muro*" = En la Parlamento ree la situacio estas de rekta kontraŭstaro. '*Parlamento*' estas tre pli ĝenerale komprenata vorto ol 'alta ĉambro' aŭ 'malalta ĉambro', kio en Esperanto devus aludi nur al la alteco de la plafono de difinita ĉambro.

Sparare ad alzo zero

La "*alzo*" estas en la pafilegoj (modernistoj nomas ilin 'kanonoj') la celilo, do ilo per kiu oni celas. Depende de la malprokismeco de la celo, al kiu oni pafas, oni devas levi la paf-tubon por ke la kuglo havu la ĝustan flug-vojon kaj atingu la celon. Tiun levon oni mezuras per gradoj. Kiam la 'malamiko' estas tre proksima oni tute ne devas levi la paf-tubon, kiu restas horizontala, kaj sekve la celilo restas ĉe la pozicio 0. Tiun pozicion, ekzemple, oni uzas kiam oni volas pafi al manifestacianta amaso. Temas pri tre mortiga ago. Sekve "*sparare ad alzo zero*" estas "tre forte/sovaĝe ataki". "*Ieri alla Camera tutti hanno sparato ad alzo zero contro il Governo.*" = Hieraŭ en la Parlamento ĉiuj fortege atakis la registaron.

La triplice (intesa)

En la politika ĵargono itala de la lastaj jardekoj "*la triplice*" simple aludas je la triopo de la sindikatoj (CGIL, CISL kaj UIL). Por uzi ĵusan frazon de Bepe Grilo (Beppe Grillo): "*La triplice sindacale è responsabile esattamente come i partiti della situazione economica attuale.*" = La alianco de la tri ĉefaj sindikatoj respondecas precize kiel la partioj pri la nuna ekonomia situacio."

Bonvolu ne uzi la mallongigojn CGIL kaj similajn, kiam vi parolas al eksterlandanoj.

Scilipoti

Domenico Scilipoti, nuntempe senatano de '*Il popolo della libertà*' [= La popolo de la libereco = La partio de la dekstro en Italujo], li estas konata kiel la simbolo mem de perfido. En 2010 li decidis eliri el sia partio por subteni la dekstran registaron. Por utiligi alian frazon de Grillo pri unu el la parlamentanoj de la Movado '5 steloj' : "*Lui e' uno Scilipoti*" = Li estas perfidulo/parti-perfidulo.

Aperturismo/aperturista

En la vortaro: "*Nel linguaggio politico, che o chi pratica e teorizza l'aperturismo.*" kaj 'malfermismo': "*Tendenza, di un partito o gruppo politico, a ricercare intese e collaborazioni con forze politiche di orientamento anche molto diverso.*" Alivorte, 'malfermismo' estas emo trovi interkonsentojn ankaŭ ĉe partioj idee tre malsimilaj kaj 'malfermisto' estas tiu, kiu faras tion. Kion povas kompreni korea komencanto? Tre malfacile li povas kompreni ion. En normala Esperanto, se oni dirus "*La FEI propone di insegnare l'esperanto come prima lingua in Italia. Una cauta apertura arriva dal Ministro della Pubblica Istruzione.*" kiel vi tradukus tion? Mi provas: IEF proponas instrui Esperanton kiel unuan lingvon en Italujo. Singarde la Ministro pri Instruado montras pretecon esplori la aferon/reagas favore al la afero/ne malakceptas la aferon. Eble 'nemalakceptismo' kaj 'neakceptisto' povus esti la vortoj, sed ankaŭ

'ĉionesplorismo' kaj 'ĉioesploristo'. Vere temas pri termino tro malfacila. Ĉu eĉ 'ebl(ig)isto'?

Buonista

En la vortaro '*buonismo*' estas: "*Ostentazione di buoni sentimenti, di tolleranza e benevolenza verso gli avversarî, o nei riguardi di un avversario, spec. da parte di un uomo politico; è termine di recente introduzione ma di larga diffusione nel linguaggio giornalistico, per lo più con riferimento a determinati personaggi della vita politica.*" Esence 'bonisto' estus la ĝusta traduko, sed neniu eksterlandano komprenus ĝin sen antaŭa studado de Italujo dum kelkaj jaroj. Eble iom pli precize oni devus diri, same nekompreneble, 'bon-afiŝisto', 'bon-montristo' aŭ tute klare 'politikisto, kiu montras siajn bonajn sentojn'. Ni rezignas pri tradukado de "*banal-buonista*", ekzemple en "*Il «banal-buonista» è un devoto delle buone cause, e di buone cause è tappezzato il mondo*" = La banala bonisto estas sekvanto de 'bonaj agadoj' kaj per bonaj agadoj la mondo estas abunde provizita. Kompreneble, ĉar ekzistas bonistoj ekzistas ankaŭ 'kontraŭbonistoj' kiel en ĉi tiu frazo: "*L'Italia è all'avanguardia di questo ritorno militante alla naturalezza della disuguaglianza di fronte alla legge, del disprezzo dell'altro, della cattiveria anti-buonista*" = Italujo avangardas pri ĉi tiu aktivula reveno al memkomprenebleco de malegaleco antaŭ la leĝoj, de malŝato de malsamuloj, de malico kontaŭbonista...

Il Ministero ha aperto un tavolo

Certe, ne temas pri tio, ke la ministro malfermis tirkeston de tablo, kiel komprenus nia mongola esperantisto. Cetere oni povas malfermi tablojn de almenaŭ du specoj: "*tavolo tecnico: Sede nella quale si affrontano e si discutono gli aspetti tecnici di un problema controverso.*" Kaj jen ekzemplo: "*Castelli incontra oggi l'Anm al tavolo tecnico sull'ordinamento giudiziario*" = Castelli [Kasteli] hodiaŭ renkontas la landan asocion de juĝistoj ĉe la teĥnika labor-grupo pri la juĝeja leĝaro. "*tavolo politico: Sede nella quale si tenta di comporre i diversi punti di vista politici esistenti, specialmente all'interno di una coalizione di partiti, in merito a un problema controverso.* Ekzemple: "*...pratica che da domenica sera sarà al centro di uno dei tre tavoli politici convocati da Silvio Berlusconi.*" = ...dosiero, kiu de venonta dimanĉo vespere estos centra por unu el la tri labor-grupoj kunvokitaj de Silvio Berlusconi [Silvjo Berluskoni]. Do, labor-grupo aŭ komisiono ŝajnas relative bona traduko. "*Al Ministero c'è un tavolo permanente per gli esodati.*" = Ĉe la ministerio estas daŭra labor-grupo pri la emeritoj sen pensio. Se vi diros, ke vi senprobleme povas traduki 'esodato', vi evidente neniam provis.

TAV

TAV signifas simple *Treno ad Alta Velocità* = Tre Rapida Vagonaro. Por japanaj esperantistoj bonvolu ne uzi la mallongigon TAV. Neniu komprenus ĝin. Poste ekzistas la "*pro-TAV*" kaj la "*No-TAV*" (ankaŭ "*No TAV*" sen streketo). "*pro-TAV*" estas evidente, tiu, kiu favoras la konstruadon de la fervoja linio por tiu vagonaro. "*No TAV*" estas tiu, kiu malfavoras tiun konstruadon. Ekzemploj: "*Daniel Cohn-Bendit... ieri mattina era nell'aula lauree di Lettere a Palazzo Nuovo a parlare di . . . Tav e No-Tav.*" = Danjel Kon Bendit (Daniel Cohn-Bendit) ...hieraŭ matene estis en la salono de la magistriĝoj en la fakultato pri literaturo en Palaco Nŭovo (Palazzo Nuovo) kaj paroladis pri... Tre Rapida Vagonaro kaj kontraŭuloj al TRV." Se oni multe parolas pri tiu temo, parole oni povas elparoli 'To-ro-vo', kaj sekve 'kontraŭtorovo-uloj'.

Convergenze parallele

La esprimo estas tre pli antikva ol ni povas supozi. En la dua duono de la 19-a jarcento sciencistoj okupiĝantaj pri antropologio inventis ĝin por paroli pri la similecoj kaj paralelecoj inter la kulturoj de malproksimaj popoloj. Tio ŝuldiĝus al la baza unueco de la homa menso (*Elementargedanken* - ĉio sonas pli serioze en la germana). Poste ĝi estis uzita ankaŭ por la kuniĝo en unu esprimon de du kontraŭdiraj terminoj, ekzemple saĝa frenezo, silenta bruo, konverĝo de paralelaj linioj. En la itala politika vivo "*convergenze parallele*" estas uzata ĉefe por indiki la laŭgradan alproksimiĝon de la kristandemokrata kaj komunisma partioj en la 1970-aj jaroj, kion oni nomas ankaŭ '*compromesso storico*'. Estas tre malsimple komprenigi la tutan aferon per malmultaj vortoj al ĉina esperantisto. Eble oni povas paroli pri 'tre laŭgrada alproksimiĝo (inter partioj)', 'alproksimiĝo kun pluteno de malsamecoj', 'alproksimiĝo kaj ne (alproksimiĝo)'.

Compromesso storico
Esprimo, kiu priskribas la politikan strategion de la itala komunisma partio inter 1973 kaj 1979. La sekretario E. Berlinguer, laŭ la sperto en Ĉilio, pensis ke oni devas realigi larĝan aliancon kun la katolika partio por povi realigi reformprogramon kontraŭ la rezisto de la plej ekstremaj reakciuloj. En Esperanto oni povas paroli pri 'historia kompromiso', kaj tiel tradukas la vortaro Minnaja. Por ke eksterlandano komprenu oni devas paroli pri politiko de 'granda koalicio' inter malsamaj partioj.

Larghe intese
Ekzistas pluraj manieroj nomi registarojn, kiuj estas subtenataj de inter si malamikaj partioj pro aparte gravaj militaj aŭ ekonomiaj situacioj. Iam oni parolis pri "*governo di unità nazionale*", alivorte 'la tuta lando uniĝas (pro la grava situacio)'. Tiel oni nomis registaron, kiu ekzistis en Italujo de 1943-1944 ĝis 1947, tuj ĉe la fino de la dua mondmilito, en kiu kunlaboris ĉiuj ekzistantaj partioj. Sed ankaŭ tre lastatempa registaro, tiu de Monti, havis tiun karakteron. Eble por eksterlandano, almenaŭ eŭropa, la plej rekonebla esprimo nuntempe estas "registaro de granda koalicio", "grand-koalicia registaro" laŭ la germana modelo. 'Koalicia registaro', ĉiuokaze, devis esti komprenebla por ĉiuj, sendepende de la grandeco de la koalicio. En ĉi tiu esprimo, cetere, 'granda' ne signifas 'vasta, larĝa' sed 'grandioza', ĉar kuniĝas tre malsamaj partioj.
Sed el iu vidpunkto ĉiuj tiuj laste menciitaj registaroj estas "*inciuci*".

Inciucio
Laŭ la vortaro: "*[dal napoletano 'nciucio, propr. «pettegolezzo, sobillamento», di origine onomatopeica]. – Termine introdotto recentemente nel linguaggio politico (e dal quale sono poi stati coniati nel linguaggio giornalistico i derivati inciucismo, inciucioso, inciuciare) con il significato originario di intrigo, intesa raggiunta sottobanco, di nascosto, e in seguito passato a indicare un piano o un accordo politico confuso, non chiaro, malamente orchestrato.*" Se ni komparas ĝin kun la vorto 'intrigo' en PIV, ni vidas, ke intrigo estas bona traduko: 'Ruza agado por sukcesigi aŭ faligi aferon: en politikaj aferoj pli ofte sukcesas intrigoj, ol meritoj; intrigoj k malicaĵoj estis forgesitaj.' La ekzemploj estas markitaj kiel zamenhofaj, do ankaŭ en Bjalistoko "*inciuci*" ne mankis. Aliaj eblaj tradukoj povus esti 'kaŝa interkonsento', 'malica intekonsento', 'fuŝa interkonsento'.

http://shockdown.com/open/grillo/

LETEROJ

Italiani nativi e omonimi linguistici

Concorso Marelli e italiani (4)

Gian Carlo Fighiera

Intervengo sul tema in oggetto perché la prima lettura del testamento lasciò anche il sottoscritto perplesso su alcuni punti. Premetto che Pier Luigi Marelli era mio coetaneo e migliore amico; in quel dopoguerra la nostra visione dell'esperanto - lingua e movimento - coincideva perfettamente. C'incontravamo sovente, ora a Milano ora a Torino, per elaborare i nostri piani giovanili. La nostra collaborazione subì una pausa nel 1955, quando lasciai l'Italia, per ritornare solo nel 1988. Prima della morte, Pier Luigi aveva continuato la sua battaglia per la lingua internazionale, sforzandosi anche di creare per i congressi della FEI una struttura organizzativa permanente che compensasse l'inesperienza dei comitati organizzativi locali. Sulla sua tomba, che visitai grazie a Carlina Sfardini, volle inciso il verso di Kalocsay "*poeto sen popolo*".

Al mio rientro in Italia mi adoperai per rendere operativo il suo lascito testamentario, inoperante da molti anni, ma nel frattempo accresciutosi grazie agli accurati investimenti di Polerani. Il giurista romano Antonio De Salvo rintracciò presso la Presidenza della Repubblica la richiesta di creare all'uopo una fondazione, e chiarì che la pratica sarebbe rimasta in sonno per un tempo indefinito, perché il capitale era considerato troppo modesto. Per questa ragione, la FEI trasformò il lascito, previsto da Pier Luigi come una fondazione, in un fondo e lo dotò del regolamento attuale. Solo poi sapemmo che una fondazione poteva nascere anche nel quadro legislativo regionale.

Detto questo. vorrei parlare del testo testamentario. Consultando il documento olografo, ci si rende conto che fu scritto di getto e non riletto. Infatti, appaiono nello stesso distrazioni banali e non corrette, come la ripetizione immediata, due volte di seguito, della medesima parola, con un effetto simile a quello di un disco rotto.

Per quanto riguarda l'interpretazione del termine "italiano" riferito ai destinatari del premio, occorre ricordare che all'epoca di Marelli il fenomeno immigrazione era sconosciuto nel nostro Paese. Io stesso sono vissuto (con responsabilità nel movimento) 34 anni in

numerosi Paesi (fra i quali il Belgio per 17 anni e la Spagna per 10) mantenendo la cittadinanza italiana, anche quando avrei potuto ottenere quella, passiva e attiva, del Paese di residenza.
Concludendo, credo personalmente che Marelli ritenesse per "italiano" la persona in possesso della cittadinanza italiana, ottenuta o per nascita da genitori italiani o per concessione dello Stato su motivata richiesta. Come in ogni Paese, anche in Italia un residente straniero può richiedere e ottenere la cittadinanza, adempiendo gli obblighi di legge e diventando a pieno titolo cittadino. Mi sento, quindi, di escludere che Marelli si riferisse col termine "italiano" a chiunque, senza distinzione, fosse semplicemente residente in Italia, ma intendesse la persona in possesso della cittadinanza italiana, indicata su un documento ufficiale.
Questa, mi pare, è l'unica interpretazione possibile.

P.S.
Un aneddoto. Nel 1958-59 vivevo a Varsavia per l'organizzazione del congresso universale. Discorrendo un giorno con Zalesky-Zamenhof, nipote del creatore dell'esperanto e membro del comitato organizzatore del congresso, accennai a Marelli. L' interlocutore mi chiese ingenuamente se, data la desinenza, "marelli" fosse l'infinito di un verbo in esperanto da lui sconosciuto.

Va bene. Sempre più si sa come la pensasse al momento della decisione di premiare i giovani esperantisti. Ma la cosa fondamentale sarebbe supporre come la penserebbe in questo momento, con questa situazione di immigrazione. Penso che a questo punto, vista anche l'impossibilità di addivenire a tale informazione, non si può che sottostare alle decisioni della Commissione e, principalmente, dell'esecutore testamentario.

Pier Luigi Cinquantini

Malkongruaĵoj en nia lingvo

Gigi Montalbano

Kio igas Esperanton lingvo aparte facila?
Ĉiu esperantisto scias tion: ĝia eta nombro da reguloj, ĝia genia sistemo de prefiksoj/sufiksoj, ĝia simplega verba sistemo, la afero, ke ĝi estas samtempe izola kaj aglutina idiomo kaj la absoluta certeco de ĝia radikaro tiel ke ĉiu radiko esprimu unu kaj nur unu koncepton.
Ĉu konsentite?
Mi opinias, ke ĉiuj legontoj konsentos pri tio supre dirita.
Tamen... rilate al certeco de la radikoj, mi kredas, ke estas iu escepto.
Lastatempe, foliumante la Vortaron Itala/Esperanto-Esperanto/Itala de Prof.ro Carlo Minnaja, kiun mi elŝutis el Interreto, mi serĉis la esperantigon de la vorto itala lama (je la senco de la sudamerika besto kiun ankoraŭ la tieaj popoloj uzas por transporti varojn ktp.)

La Vortaro de S.ro Minnaja tradukas lamo.
Mi ne sukcesis, tion legante, eviti la surprizon ĉar, kvankam ne estas lerta esperantisto, de la komenco de mia interesiĝo pri Esperanto, mi lernis, ke la adjektivo lama signifas, en la itala, *zoppo* kaj sekve la vorto lamo nepre devas signifi *zoppìa*.
Nu, krom la afero, ke la vorto itala *zoppìa* eĉ ne aperas en la priparolata Vortaro, mi kredas, ke ne eblas, en Esperanto, uzi la saman radikon je du malsamaj sencoj, alikaze oni riskas detrui pilastron de la lingvo.
Mi pensis, ke aŭtoritata Vortaro, kia tiu de Prof.ro Minnaja enhavas nur eraron, kiu estas nature korektebla; tamen, mi provis serĉi la vorton lamo en PIV kiu nun estas legebla rete, kaj... la saman sencon mi trovis:
lam/o^{Z}
1 G. (Lama) de remaĉantaj mamuloj el la ordo de parhufuloj, fam. de kameledoj, sed sen ĝibo, vivantaj en S Ameriko.
2 Sp. (Lama glama) de tiu g. kun longaj haroj, ĉefe ĉe la kolo de la virbesto, uzata kiel ŝarĝbesto; tre parenca al gvanako. -> alpako, vikuno. -> ljamo.
Do, kio okazas? Mi estas klopodanta fari prezentadon en mia urbo, de la lingvo Esperanto, dum kiu, mi planis emfazi la kvalitojn de ĉi tiu lingvo, inter kiuj, la absoluta certeco de ĉiu radiko kiu tute distingas Esperanton el la etnaj lingvoj kie estas facile trovi identajn vortojn havantajn malsamajn sencojn (itala: pésca/pèsca).
Mi certe ne plu povos orgojle aserti tion kaj ekdemandas al mi mem ĉu vere estas seriozeco tra la esperantistaro aŭ ne.
Kial ne esperantigi la vorton alimaniere? Plurajn vortojn rilatantajn al bestoj aŭ plantoj oni esperantigas uzante la sciencan nomenklaturon, nome la latinajn vortojn, ekzemple melo (it. *Tasso*), bufo (it. *Rospo*) aŭ migdalarbo (it. *Mandorlo*): kial ne fari la saman pri la priparolata sudamerika besto kaj nomante ĝin glamo?
Spite al pluraj streĉoj Esperanto daŭrigas esti miskonata lingvo: sed ĝi havas nediskuteblajn virtojn kiuj povas igi ĝin, estontece, internacia komunikilo. Se oni ekdetruas eĉ tiujn virtojn estas preferinde ĉion forlasi kaj okupiĝi pri aliaj aferoj.

La Majstro mem diris ke kiam li kreis la lingvon, li volis ke ĝi ne restu simpla komunikilo meĥanika, li volis ke ĝi komencu vivi kaj evolui kiel ĉiuj lingvoj. Do praktike rezignis pri la perfekteco de tute skemisma lingvo. Tiun volon oni povas rimarki el la 15a regulo, pri la internaciaj vortoj: aŭtomata "ilo" por enkonduki vortojn kiuj estas komunaj al diversaj lingvoj.
*Se vorto estas tiel internacia ke ĝi ĉeestas en dekoj da lingvoj, kial rezigni por krei pli skemisman vorton. Se "lamo" ĉeestas en la vortotrezoro de la plejparto de la lingvoparolantoj (ita, fra, his, rus, pol, ger, por citi tiujn de mi esploreblajn hejme), ĉu uzi la latindevenan vorton (*Lama glama*) kun la risko, ke eĉ la sudamerikanoj ne komprenu ĝin, vere utilas? Ĉu tiel la lingvo estus pli perfekta? Kiom ofte en komuna konversacio du homoj povos miskompreni unu la alian ĉar unu celas beston kaj la alia vunditon?*

Pier Luigi Cinquantini

iej nova s@nto
SPAZIO GIOVANE PER I GIOVANI
http://iej.esperanto.it

Certi tute pri nenio estas, laŭ mi, esenca trajto de racieco
Bertrand Russell

En la lando de la kuloj
Kronikoj de IJS 2013

Lobo

Dum mia dua jaro kiel estrarano de IEJ (Itala Esperantista Junularo) mi finfine decidis partopreni eksterlandan aranĝon. La elekto estis eĉ tro facila, ĉar mia Esperanto multe ŝuldas al Hungario (kies loĝantoj fakte estis la unuaj eksterlandanoj kiujn mi ekkonis dum mia unua aranĝo, kaj emigis min eklerni la lingvon). Post IJF 2013 en Italio, kiu malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj estis sukcesa aranĝo, mi aliĝis al IJS per la interŝanĝprogramo inter IEJ kaj HEJ.
Ĵus fininte mian laboron kiel organizanto, malkovri la alian flankon ĝuante festivalon kiel normala partoprenanto estis interesa sperto. Fakte, kiu organizas aranĝon kaj klopodas bone fari sian laboron atentegas ne lasi ion je la hazardo. Kaj tuj poste lernas lecionon: kion oni lasas je la hazardo, la hazardo prenas.
Se tio okazis dum IJS, certe ne estis facile rimarkebla. La programo estis bona, lasis sufiĉe da libereco por trankvile ĝui la lagon, la organiza teamo eĉ pretis alfronti eblan malbonan veteron (kiu bonŝance ne okazis) per alternativa programo! Sed mi ordigu kronologie…
La akceptado okazis subĉiele, boteloj da akvo abundis (kaj estis nekredeble bonvenaj, post sufiĉe longa promenado kunportante valizojn), la vespermanĝo preskaŭ jam pretis (je la 18.30???!). La bona etoso jam spireblis, igante la transiron inter vojaĝo kaj festivalo tute ne traŭma, eĉ por la novuloj kiuj ne vere kapablis sin esprimi Esperante (jes, mi konvinkis amikojn partopreni, sed ilia Esperanta nivelo ege maltrankviligis min antaŭ nia alveno!).
La interkonaj ludoj certe rompis la glacion, eĉ se la vojaĝa laceco iom malhelpis ĝui la unuan vesperon. Verdire, ankaŭ la ĉiutaga laceco ĉiam senteblis postvespermanĝe, do foje oni preferis simple ĝui malvarman malmultkostan bieron kaj spekti la kuraĝulojn (unue inter ili la organizan teamon) strebi por animi la vesperojn. Sed mi denove deflankiĝantas.
Eĉ implikante la lokajn instituciojn, HEJ organizis la solenan malfermon ĉe la "konkerita" urbodomo (la estraranoj hisis la verdan flagon flanke de la hungara… certe multe da esperantistoj aprecis!); sekvis la urba ludo, kiun partoprenis kvin teamoj. Mi fiere anoncas ke mi estis en la sesa, la "teamo" kiu preferis kafumi trankvile. Bedaŭrinde la taga varmo ne ĉiam emigis homojn vigle partopreni la ludojn… kaj vespere kulpis la kuloj!
Pri la kuloj… ili estis fidelaj kamaradoj de ĉiuj partoprenintoj dum la tuta aranĝo. Fakte ne eblis senti sin solaj, kaj ĉiuvespere oni improvizis "dancojn" kun ili… multaj mortis pro la troa pasio, sed multaj pli alvenis… bedaŭrinde la samo ne funkcias kun homoj, aŭ perdance oni povus allogi milionojn da novaj esperantistoj!
Ne mankis la kursoj de Esperanto kaj de la hungara, interesaj prelegoj, malstreĉigaj aktivecoj, kaj sporto. Certe, la matena kurado estis iom troiga (dum E-aranĝoj la plejparto de la partoprenantoj ne kredas je la antaŭtagmezo), kaj la kapoejraj lecionoj je la 15a kun kvardek gradoj malkuraĝigis multajn homojn (aŭ eble la kialo estis la instruisto, kiu bezonis iom pli da vorttrezoro kaj gramatiko. Jes, mi estis la instruisto). Ĉiuj programeroj ekis kaj finiĝis akurate, kaj havis bonan sukceson… kiam laceco aŭ malkuraĝo retenis la homojn, la organizantoj pretis disdoni "likvan kuraĝon" al ĉiuj, revigligante la animojn.
La pluraj eblecoj por ekskursi permesis al la partoprenintoj elekti kiel pasigi la tempon laŭinkline: por la plej aventuremaj estis kanuumado (puŝi kanuon tra la akvoj de la lago Tisza, admirante la pejzaĝojn estis simple mirinde kaj amuzege) kaj aventura parko, por la plej trankvilemaj estis la ekolo-

gia centro kaj la ekskurso al Eger post kiu oni eĉ povis elekti inter vingustumadi aŭ ripozi ĉe termala parko.
Resume, estis belega sperto, bonhumoriga kaj neforgesebla. Spekti la sindevigon de la organizantoj, la amuziĝon de la partoprenantoj, senti la intensan etoson, vere montras kiel la junuloj havas kapablojn, havas la povon organizi eventojn kaj entreni homojn. Se la Esperanta movado rajtas paradi per sukcesaj renkontiĝoj la kialo estas en la entuziasmo de ĝiaj subtenantoj. Kaj certe la entuziasmo ne mankis al HEJ dum la semajno, tiom forta ke la sekva PRS (PostRenkontiĝa Sindromo) estis la plej terura en mia vivo. :)
Dankon!

Memoraĵoj de italo en Hungarujo

Emanuele Regano

Salutojn karaj geamikoj, mi ĵus revenis el Hungarujo kaj mi volas raporti al vi pri tiu ĉi vojaĝo!
Mi partoprenis IJS-on danke al interŝanĝo de HEJ kun IEJ, kaj ĝi estis mia unua e-aranĝo eksterlande. Mi atingis Hungarujon per aviadilo de Milano kun tri aliaj italoj (la fama Lobo kaj du novuloj liaj geamikoj); post dormado en hoteleto matene ni alvenis stacidomon por preni vagonaron al Tiszafüred, kaj renkontinte aliajn geesperantistojn ni ekvivis Esperantan etoson, plie en Füzesabony ni kuniĝis al la karovano de Alekĉjo por atingi kongresejon, kaj ekde tiam komenciĝis IJS.
En la kampadejo ni estis bone gastigitaj de hungaraj geesperantistoj, kiuj montris al ni niajn ĉambrojn; kiuj estis komfortaj kaj eĉ ne tro varmaj, ĉefe kompare al la tendoj, kie matene ne eblis dormi pro la varmo (kaj mi certas pri tio ĉi ĉar sensukcese mi provis…); ununura problemo estis la abundo da kuloj, kiuj estis preskaŭ ĉie ekstere kaj ene de ĉiuj lokoj, kaj kontraŭ ili estis veraj bataloj manbatante aŭ sin ŝirmante per ĥemiaĵoj.
Tuj post nia alveno ni ĉiuj ricevis T-ĉemizojn de la evento, kiuj estis kvazaŭ uniformo kaj ĉiuj ĝin uzis, kaj estos kara memoraĵo de la evento. Post nia alveno ni vespermanĝis, kaj la vespermanĝo estis, kiel la plejparto de la manĝoj, ege abunda sed laŭŝajne iom tro varma rilate al la varmega vetero de tiuj tagoj, sed tio ĉi ne estas vera problemo kiam ni manĝas kune kaj ĝoje.
La vesperoj estis ege interesaj kaj havis buntan programon: koncertoj, diskejo, kvizo (eble iom tro hungareca en siaj demandoj, multnombre pri IJS aŭ hungara historio), popol-dancoj ktp.; tiuj vesperoj permesis al ni plie interkonatiĝi gustumante brazilan kaĉason aŭ lokan *pálinka*-n kaj dancante aŭ simple aŭskultante la muzikon.
Ege interesaj estis eĉ la kursoj pli aŭ malpli seriozaj, noktaj aŭ tagaj, pri hungara lingvo, kursoj, kiuj fakte vere utilas en trinkejo kun gedeĵorantoj kiuj parolas nur la hungaran!
Momentoj ege interesaj kaj amuzaj estis la ekskursoj: la unua estis la duontaga: la kanuumado (kiun ni preskaŭ tuj renomis kanabumado, sed kial neesplikeblas…) ĝi estis kvarhora kanuumado tra la lago Tisza, ĝi fakte estis iom laciga, sed sendube interesa montranta buntan pejzaĝon kaj plurajn birdojn kaj akvoplantojn, la problemo estis nur ke, ne havante sperton pri kanuumado, oni ege facile eniris arbojn aŭ lagbordon, anstataŭ rekten iri, sed forpreninte tiajn etajn problemojn la ekskurso ege bonis.
Tuttaga ekskurso okazis en Eger, kie matene ni vizitis la urbon, kaj posttagmeze ni disdividiĝis kaj unu grupo kaj mi kun ili iris al la banejo, dum la alia iris al vingustumado, la banejo certe belis kun ĝiaj ludoj, malvarmaj, varmaj kaj "varmegaj" akvoj, sed juĝante laŭ la mienoj de la vingustumintoj ilia ekskurso estis ege pli "kontentiga", sed mi vere ŝatis eĉ la banejon.
Ju pli mi pensas pri tiu ĉi IJS-o des pli aperas en mia menso belaj momentoj pasigitaj en lago aŭ en kampadejo, en trinkejo aŭ en manĝejo, sed mi ne povas ĉion rakonti, kaj multaj memoraĵoj mi volas konservi por specialaj tagoj, eble malfeliĉaj, en kiuj tiaj memoraĵoj reĝuigos min kaj la geamikojn, kaj mi nur povas inviti ĉiujn fari tiajn spertojn por enhavi tiajn memoraĵojn, do venu al iu E-aranĝo, IJS aŭ IJF aŭ io alia ne gravas kiu, gravas, ke vi ĝuu ĝin!
Kaj mi sendube ege ĝuis tiun ĉi festivalon, danke al la bunta programo, al la bela etoso, kaj al la multnombraj partoprenantoj, eĉ el Brazilo, kaj sendube mi volas revivigi tiun ĉi sperton en la estonteco.
Egan dankon al ĉiuj la organizintoj kaj partoprenintoj de tiu ĉi IJS!

Interŝanĝprogramo, come partecipare ai Festival esperantisti giovanili a costo zero

Chi l'ha detto che per trascorrere un Capodanno indimenticabile bisogna saccheggiare il proprio conto in banca?
Se hai meno di 30 anni, parli (o desideri migliorare) l'esperanto, sei un/a tipo/a a cui piace prendere parte attivamente ad eventi internazionali e circondarsi di persone, allora non ti resta che aprire bene gli occhi e le orecchie per non lasciarti sfuggire le interessanti opportunità che la Gioventù Esperantista Italiana - IEJ mette a disposizione ai suoi tesserati per viaggiare, imparare e divertirsi.
Hai mai sentito parlare dello JES (Junulara E-Semajno)? Organizzato ad anni alterni in Polonia e in Germania, lo JES ti permette di trascorrere l'ultima settimana dell'anno tra botti, cenoni, gite, conferenze ed incontri interessanti in compagnia di centinaia di giovani esperantisti europei, per festeggiare nel migliore dei modi la notte di San Silvestro e l'inizio del nuovo anno.
Nel 2013 lo JES farà tappa a Szczawno - Zdrój, Polonia, dal 28 dicembre al 4 gennaio.
Anche quest'anno la Gioventù Esperantista Italiana incentiva i suoi tesserati a prendervi parte attraverso un accordo super vantaggioso che prevede, a seconda dei casi e delle richieste, la partecipazione di due tesserati paganti metà quota ciascuno, oppure un solo partecipante non pagante. Proprio così: completamente gratis.
In cambio, ai partecipanti è richiesto di offrire la loro buona volontà per dare una mano con l'organizzazione e la gestione delle attività in seno allo JES, collaborando in qualità di memzorganto fianco a fianco con gli organizzatori del festival e provvedendo da sé per i pasti ed il posto letto (quindi tenda, sacco a pelo, etc.).
Un piccolo sacrificio che però, lo ricordiamo, vale la partecipazione a costo zero ad un evento che richiama ogni anno tanti giovani esperantisti europei, utile per arricchirsi e divertirsi in egual misura.
Ma le opportunità per viaggiare e divertirsi grazie all'esperanto non finiscono qui.
Ogni anno in Francia, verso la seconda metà di Agosto, ha luogo il più grande festival giovanile di musica esperantista d'Europa, il FESTO. Come per lo JES, l'accordo prevede la partecipazione a titolo gratuito di una persona, oppure di due persone paganti metà quota ciascuno, a patto che collabori per l'organizzazione delle attività festivaliere e sia autosufficiente per quanto concerne i pasti e il posto letto.
Con le medesime modalità, infine, è possibile prendere parte anche all'Internacia Junularo Semaino - IJS, che si tiene ogni anno in una località diversa dell'Ungheria tra la fine di luglio e i primi di agosto. Un'altra ottima occasione per godersi la natura del posto insieme ad un folto gruppo di partecipanti e condividere con loro momenti indimenticabili tra pasti, lezioni, incontri, feste, e molto altro ancora. Sempre in compagnia della lingua esperanto, ovviamente!
Ricordiamo che il tesseramento con l'IEJ per l'anno 2013/2014 prevede le seguenti tariffe: 14 euro per chi ha meno di 25 anni, 28 euro per chi invece ne ha più di 25.
Se hai domande sull'*interŝanĝprogramo* o desideri inviare la domanda di partecipazione per prendere parte ad uno degli Festival giovanili sopra elencati scrivici all'indirizzo e-mail: iej@esperanto.it
Per ulteriori informazioni, non dimenticare di visitare il sito della IEJ: http://iej.esperanto.it/.

NOVA SENTO a cura della IEJ

Redattore

Samanta Chittolina
novasento@esperanto.it

Conto Corrente Bancario
Federazione Esperantista Italiana - Sezione Giovani
IBAN:
IT84T0306234210000000932107

Lega Internazionale degli Insegnanti di Esperanto - Sezione Italiana

Giornata Mondiale degli Insegnanti 5 ottobre 2013:

Sostenete gli insegnanti!

In occasione della Giornata Mondiale degli Insegnanti 2013, la Sezione Italiana della Lega Internazionale degli Insegnanti di Esperanto rivolge il suo saluto a tutti gli insegnanti italiani con le parole espresse dalla direttrice generale dell'UNESCO, Irina Bokova, in occasione di una precedente giornata degli insegnanti:

"Prendere posizione a favore della professione degli insegnanti significa fornire loro una formazione adeguata, uno sviluppo professionale continuo e la protezione dei diritti degli insegnanti."

In tutto il mondo una formazione di qualità offre la speranza e la promessa di un migliore tenore di vita per la popolazione tutta. Tuttavia non ci può essere un'istruzione di qualità senza insegnanti competenti e motivati.
In questo giorno chiediamo che gli insegnanti possano ricevere ambienti di lavoro favorevoli, una formazione di qualità adeguata, nonché «garanzie» per i diritti e le responsabilità degli insegnanti ... Ci aspettiamo molto dagli insegnanti – essi, a loro volta, hanno ragione di aspettarsi tanto da noi. La Giornata mondiale degli insegnanti è un'opportunità per sentirsi al loro fianco.
Gli insegnanti ... aiutano gli studenti a pensare in modo critico, ad elaborare le informazioni provenienti da diverse fonti, a collaborare, ad affrontare i problemi e ad effettuare scelte consapevoli.

Perché prendere posizione a favore degli insegnanti? Perché la professione di insegnante sta perdendo lo status in molte parti del mondo. La Giornata Mondiale degli Insegnanti richiama l'attenzione sulla necessità di elevare lo status della professione - non solo a beneficio di insegnanti e studenti, ma per la società nel suo insieme, di riconoscere il ruolo cruciale che giocano gli insegnanti nella costruzione del futuro.

In particolare gli insegnanti della lingua internazionale esperanto in tutto il mondo operano in situazioni difficili ed incerte dal punto di vista normativo, della formazione e della sicurezza della loro attività, ma nonostante ciò sono coscienti del valore dell'insegnamento di una lingua giusta nei rapporti internazionali, il cui studio, tra l'altro, ha notevoli ricadute sulla formazione linguistica e metalinguistica degli allievi. Essi auspicano che in Italia una legge della Stato finalmente dia uno status certo a questa materia.

ILEI-Italia
presso FEI, Via Villoresi, 38 20143 Milano
tel. 02.58.100.857
ILEI.Italia@esperanto.it
www.esperanto.it